

N-ro 2

Aŭgusto

1912

★ ESPERANTISTA ★
GAZETO
DANLANDO ★

Sub redakcio
de
ANDR. NISSEN



**Eldonejo Esperantista
KOPENHAGO**

8132





Internacia Organizo.

KIAM ĉi-tiu numero de la gazeto aperas, niaj elsenditaj delegitoj certe estas mieze en la voĉdonado pri la tre diskutita temo „la internacia organizo“. — Pro la neapero de nia gazeto „Dana Esperantisto“, ni ne trovis okazon sciigi al niaj legantoj sufiĉe pri ĉi-tiu vere brulanta punkto en nia movado. Tiu esperantistoj, kiuj legas eksterlandajn gazetojn certe jam konas la aferon, sed eble ne ĉiuj klare komprenas la tutan aferon pro la ĥaosa diskutado pri ĝi.

Esperantistoj, precipe la novaj, kiuj ne legas fremdajn gazetojn, certe volonte deziras aŭdi iom pri tiu, kiu nun estas diskutata dum la Krakova kongreso.

Pro tio ni petis nian samideanon Finon *Margrethe Noll*, kiu estas membro de la Administra Komitato, kaj tial plej bone konas la aferon, doni al niaj legantoj mallongan klaran resumon pri ĝi.

* * *

Kun plezuro mi pruvos plenumi la deziron de la redakcio, kompreneble mi ne en la malmulte da loko, kiun donas al mi la redakcio, povas montri detale aferon, pri kiu oni jam plenigis libretojn.

La demando estas: Ĉu nia internacia afero bezonas internacian organizon? Al tiu demando saĝaj homoj kompreneble nur povas respondi „jes“.

Alia demando: Ĉu ni deziras tian organizon? Tie komencas la malfacilaĵojn. Kelkaj opinias jes, aliaj ne. Nia saĝa Majstro mem rekomendas la organizon (vidu Dana Esp. Julio 1911 Propono pri organizo de niaj kongresoj, kaj Sept. 1911 Kongresa parolado de Dro Z.); tre klare li esprimas, kial ni bezonas internacian organizaĵon. En Antverpeno almenaŭ oni bone komprenis la neceson, kaj la rajtigitaj delegitoj de la „Sepa“, principe akceptis lian proponon, kaj oni elektis komision, kiu devas studi la demandon, pri kiamaniere ni plej bone donos firman bazon al niaj oficialaj institucioj, Lingva Komitato, Akademio, Centra Oficejo k. p. t, starigos unuiĝon de naciaj esperantistaj societoj kaj kreos amikajn

interrilatojn inter propagandaj kaj specialaj fakaj kaj aplikaj societoj kiel ekz. U. E. A.

La anoj de tiu komisio estas: Sroj *Bourlet, Cart, Cefec, von Frenckel, Hodler, Kandt, Michaux, Mudie, Reed, Rollet de l'Isle, Perogordo, Pujula, Schmid, Sebert, Van der Biest, Warden.*

Post la „Sepa“ diversaj Esp.-gazetoj komencis skribi kontraŭ la organizado kaj diris, ke ni jam havas U. E. A. Precipe la direktoro de U. E. A. en stranga fanatika maniero propagandis kontraŭ la ideo de propaganda organizaĵo internacia, se ĝi ne estos aligata al U. E. A. (Vidu lian broŝuron: Kiel nin organizi?). Ĉu li tiel agas pro timo je konkuranto al sia unuiĝo, mi ne scias; se li malfermus la okulojn, li vidus, ke internacia propaganda organizaĵo nur estos helpo al li.

Ni ne forgesu, ke U. E. A. estas „peresperanta“ unuiĝo; ĝi servas al la publiko per Esperanto; se ĝi ian belan tagon anstataŭ Esperanto alprenus Idon aŭ alian pli bonan lingvon kiel servilon, la esperantistaro kompreneble ne povas uzi U. E. A. kiel sian plej altan organizaĵon. La organizaĵo, kiun ni devas havi, devas estis nura „poresperanta“ afero, kiu povos reprezenti nin en okazoj, kiuj ne speciale koncernas al unu el niaj jam ekzistantaj oficialaj organizaĵoj.

U. E. A. ne bezonas timi konkuranton en la starigonta unuiĝo, ĝi certe sufiĉe forte enradikiĝis kaj ne falos tiam longe, kiam ĝi gardas sin mem kaj siajn proprajn aferojn kaj plenumas siajn servojn je la kontenteco de siaj membroj, se ĝi tro multe okupas sin pri aferoj, kiuj ne koncernas al ĝi, ĝi riskas tre facile perdi siajn membrojn kaj pereigi sin mem.

Niaj naciaj organizaĵoj ne plu sufiĉos por la propagando kaj tutmonda disvastigo de Esperanto, ni laboras laŭ diversaj planoj, kaj ni ne scias, al kiu plej alta instanco ni devas turni nin en kazo de bezono; tian organizaĵon ni kreu, ju pli rapide des pli bone, ĉiam memorante, ke unueco estas forteco.

Ni respektu kaj subtenu la opinion de nia Majstro; ĝis nun li ĉiam sin montris kiel vera saĝulo ankaŭ en la aferoj, kiuj praktike rilatas al la Esperanto-movado, tial ni nun je lia jubilea festo ŝuldas al li duoblan dankon. Forte ni staru ĉirkaŭ li, unuigitaj ni laboru; paco regu en la esperantistaro!

Margrethe Noll.

Ni plene interkonsentas kun *Fino Noll*, kaj kiam la dana esperantistaro dum la jarkunveno en Vejle esprimis la deziron, ke

„la internacia organizaĵo estu starigota laŭ la deziro de la plimulto“ ĝi havis la internan senton, ke la deziro de la plimulto estas konforma je la deziro de nia Majstro.

La red.

Vojaĝmemorajoj el Norvegujo.

En Kristiania okazis de la 19^a ĝis la 23^a julio granda internacia kongreso. La eŭropaj „Kristanaj Celadanoj“ kunvenis ĉi-tie, kaj ĉ. 800 membroj ĉeestis. Niaj fervoraj norvegaj samideanoj tiaokaze multege laboris, kaj ili atingis permeson ĉe la kongres-komitato por aranĝi apartan esperantistan kunvenon rilate al granda propac-demonstracio, lundon la 22^{an}.



Konataj norvegaj samideanoj.

Samtempe okazis tiu-ĉi demonstracio en du grandaj ĉambregoj, por la diversaj naciparolantaj membroj en tre granda kaj bele ornamita misiodomo, kaj por esperantistoj en pli malgranda, sed ankaŭ tre bele ornamita domo, kie estis aranĝata ekspozicio esperanta. Tie mi havis la plezuron renkonti du junajn virojn, membrojn de Horsens Esperanto-klubo, Srojn *Jensen* kaj *Nielsen*, kiuj nuntempe loĝas en Kristiania. En ambaŭ lokoj oni samtempe faris propacparoladojn kaj formulis petskribon al registaroj kaj parlamentoj. La esperantan kunvenon gvidadis Sro redaktoro *Berg-Jæger*, li ne ankoraŭ estas esperantisto, sed li tre interesas sin je la lingvo, li parolis per interpretisto, kiu estis tre juna, sed treege fervora kaj lerta norvega samideano, Sro *Rifling*. Dum la kunveno la sekvanta dokumento estis formulita: „La eŭropa Kristana „Celado-Kongreso en Kristiania proponas al ĉiuj naciaj asocioj de „Kristana-Celado, ke ili sendu petskribon al la registaroj kaj parlamentoj de siaj respektivaj landoj, ke oni de nun klopodu pli „energie ol iam antaŭe por starigi arbitracian juĝantaron pri ĉiuj „internaciaj konfliktoj kaj pere pacan solvon de ĉiuj enlandaj malpacigaj demandoj, tiel ke la pacreĝo Jesuo Kristo ekregadu la „popolojn kaj progresigu sian regnon inter ĉiuj teranoj“.

La kristaniaj esperantistoj estis petantaj min fari la ĉefparoladon, mi faris tion, kaj poste saksa samideanino *Fino Rosse* alportis saluton de siaj gesamlandoj, kaj skota pastro, Sro *Beveridge*, prezidanto de la skota esperanta ligo, salutis de sia lando. Li rakontis inter alie, ke li antaŭ kelkaj jaroj tradukis la „Prediko sur la monto“, kaj li ricevis multajn dankleterojn eĉ de la plej malproksimaj lokoj, ekzemple Los Palmos.

La kongreso konvinkis multajn eminentulojn de la unuiĝo pri la neceso de internacia lingvo, ĉar oni estis devigitaj traduki norvege-germanen, angle-germanen, germane-anglen k. t. p., kaj tamen la hispanaj kaj hungaraj kongresanoj ofte komprenis malmulte. Vere estis babela konfuzo, je ĉiu tradukaĵo la parolo perdis valoron, kaj eĉ tre gravaj eraroj estis faritaj. Mi tre ofte aŭdis la vortojn: „Jes nun ni komprenas kaj konsentas, ke esperanto vere estas bona komprenilo ja eĉ necesa ĉe internaciaj kunvenoj“. La esperantista movado en Kristiania per tiu-ĉi kongreso certe bonege forpuŝiĝos, sed ĝi ankaŭ havas lertajn kaj fervorajn laborantojn.

Serioza laboro kaj plezuro intermiksiĝis, la kongresanoj havis belegan ekskurson al „Holmenkollen“ kaj per varporŝipo sur la fjordo, sed la kulminacio de la festo okazis lundon, kiam ĉiuj

kongresanoj estis akceptitaj de la norvegaj gereĝoj ĉe „Oskarshal“. La gereĝoj premis la manon de ĉiu, kaj parolis vigle kaj amike al multaj kaj norvegaj kaj eksterlandaj membroj; militista or-



Komunuma instruistino F-ino Rosa Bye kune kun
siaj blindaj Esp.-lernantoj.

kestro belege ludis, kaj refreŝaĵoj estis preparitaj sur granda platformo antaŭ la kastelo. Oni aŭdis multajn laŭdaĵojn pri la afablaj gereĝoj de Norvegujo kaj pri la ĉarma malgranda kronreĝido Olav, la plej konata kaj plej ŝatata vireto en la lando. —

La anglaj kongresanoj venis per propra vaporŝipo kaj forve-

DANLANDO


turis tuj post la lasta kongres-kunveno mardon vespere. Ili afable permesis al mi partopreni iliajn ekskurson tra la norvegaj oksidentaj fjordoj, kaj tial mi, la sola fremdulo, kune kun 250 angloj vojaĝis tra la plej belaj partoj de la belega Norvegujo. Inter la vojaĝantoj estis du skotaj kaj unu angla samideano. Dum la vojaĝo mi tre ofte parolis pri Esp.; la prezidanto de la eŭropa ligo de Kristana Celado S^{ro} *Pollock* el Belfast tre bone konas la lingvon, li bedaŭris, ke ventego trans la norda maro malfruigis la vojaĝon tiagrade, ke li ne povis ĉeesti la esperantan kunvenon. Aliaj eminentaj laborantoj en la movado diris al mi, ke ili tuj post reveno al la hejmo intencas komenci la esperantan studadon.

Ĉe ĉarmega „Stalheim“, proksime de „Sognefjord“, mi disiĝis de miaj anglaj kunvojaĝantoj, nun amikoj, ili montris al ilia interpretisto »*Miss Dannebrog*«, tiu estis mia nomo sur la ŝipo, la plej grandan amikecon kaj faris al mi tre ŝatatan memoraĵdonacon; mi neniam forgesos ilin. —

Fine mi per vagonaro iris de Voss al Kristiania, kie nia kara samideanino *Fino Finholdt* gastame akceptis min kaj kondukis min al la vaporŝipo „*Reĝino Maud*“ por diri al mi la plej lastan adiaŭon kaj la esperantan „ĝis la revido“.

La ŝipo estis flagornamita je la honoro de *Einar Mikkelsen* kaj lia fidela kamarado *Iversen*, la famaj danaj esplorantoj de la arktaj teritorioj, kiuj ĵus revenis de trijara polusa esplorvojaĝo, de kiu ili hejmen portis la taglibrojn kaj notaĵojn de ilia antaŭ 4 jaroj pereinta samlandano *Mylius Eriksen*. Ankaŭ multaj germanaj membroj de Kristana Celado forvojaĝis samtempe, kaj ili per belaj kantoj adiaŭis iliajn norvegajn samcelanojn. Estis tre bela kaj solena forvojaĝo, kaj mi forlasis la grandegan, belegan Norvegujon plenigita je ĝojo, danko kaj plej bela memoraĵo.

Asta Mikkelsen.



Kloden rundt

Amerika. Handelsskolen »*Worcester Business Institute*« har fra nu af indført Esperanto-Undervisning med Kursus baade for Begyndere og Viderekomne.

I Ithaca har Studenterne fra »*Cosmopolitan Club*« og »*Cornell-*

Universitetet besluttet ivrigt at studere Esperanto, for ved den internationale „*Corda Frates*“ Kongres i 1913, at kunne samtale med de udenlandske Delegerede, der alle forstaar og benytter Esperanto.

Skoleeleverne fra de højere Skoler har dannet en Esp.-Klub, der stadig vokser.

I Chicago har man indført en ny Dans „*Esperanto-Dans*“. I denne By er det særligt blandt de bøhmiske Amerikanere at Esperanto gør Fremskridt. Læger, Apotekere, Jurister, Arkitekter, Ingeniører, overhovedet Videnskabsmænd er stærkt repræsenterede blandt disse.

I Central-Kontoret i Kuba er nu 449 Esperantister indskrevet.

De praktiske Amerikanere begynder nu at komme med, det ene Kursus efter det andet dukker op, Bladene omtaler i lange Artikler Esperanto; Esperanto-Foreningerne faar Pengeunderstøttelse af Magistraterne i forskellige Byer, kort sagt, det varer ikke længe før Amerika indtager Førerstillingen indenfor Esperanto.

England. Vor ivrige Samideano *Edmond Privat* har været en Tur i England og selvfølgelig holdt mange Foredrag. Privats Veltalenhed river altid Tilhørerne med, altid hverver han nye Tilhængere, som oftest betydningsfulde Personer. I Birmingham talte han saaledes i Universitets franske Klub for over 100 Personer; i Reigate talte baade han og *Mudie* og vandt Borgmesteren for Esperanto. Ogsaa den engelske Krigsminister, Lord *Haldane*, har Privat faaet interesseret for Esperanto.

Bulgarien. Ministeriet for Folkeundervisning har aproberet en af vor Samideano *J. H. Krestanov* forfattet bulgarisk Esp.-Lærebog, og i en Rundskrivelse anbefalet den til alle Gymnasier, Forgymsnasier og pædagogiske Læreanstalter, saavel som til Distriktskoledirektørerne. Det er sikkert det første Skridt til Esperantos Indførelse i de bulgariske Skoler.

Charleroi. Den derværende Esp.-Forening har af Magistraten faaet 200 Frc. til at fordele som Præmier til de flittigste Skoleelever, for at de kan komme med til den nationale Kongres i Gent. Foreningen har selv givet 25 Fr. i samme Øjemed. For at komme i Betragtning maa Eleven være 16 Aar, maa flittigt have fulgt Esperanto-Undervisningen og endelig have bestaaet en Eksamen.

DANLANDO

Lons-le-Saunier. Prof. *Payebin* fik for nogen Tid siden overrakt en Bronze-Medalje, der paa Skoleraadets Indstilling var tildelt ham af Ministeriet for offentlig Undervisning, som Tak for hans 4aarige Undervisning i Esperanto ved Skolen.

Haag. Magistraten har bevilget nogle Hundredede Mark til et Forsøg med Esperanto-Kursus for jævnaldrende Elever.

Frankfurter Zeitung meddeler, at man er ved at oprette et stort internationalt Korrespondance-Bureau for katolske Blade i alle Lande. Dette Presseforetagende, der understøttes af høje Gejstlige, vil i alle større Stater faa særskilte Bureauer samt Korrespondenter i alle Lande. Centralbureauet kommer til at ligge i München med Direktør *J. A. Kral* som Leder. Som Meddelelsesmiddel mellem de forskellige Bureauer har man valgt Esperanto.

Pave Pius X har forøvrigt fornylig skrevet til en Missionær i Canada, at Esperanto vil kunne yde den katolske Kirke store Tjenester.

Varietea Esp.-Ligo, som er stiftet af Brødrene *Camilo* og *Karlo Schwarz*, tæller nu over 800 Medlemmer.

Kina. Den kinesiske Republiks Præsident, *Yuan-Shi-Kai*, der er en meget praktisk Mand med et aabent Blik for alle Fremskridt, nærer bl. a. ogsaa en uhyre stor Interesse for Esperanto og vil gerne have Sproget indført i alle Skoler. Han indser tilfulde den Nytte, Kineserne vil have af at lære Esperanto; de kommer jo derigennem i Berøring med det latinske Alfabet, de europæiske Sprogs Gramatik o. s. v., ligesom Verdenslitteraturen bliver tilgængelig for dem. Er Esperanto først indført i Kinas Skoler, vil det bevirke, at de Folk, der ønsker at træde i Handelsforbindelse med Kina, maa lægge sig efter Esperanto.

Breslau. For Esperantister, som var paa Vej til Krakowkongressen, fandt der Fredag den 8. ds. en større Fest Sted i Borgerrepræsentanternes Sal paa Byens Raadhus. Formanden for den stedlige Esp.-Forening, Herr Overpostassistent *Berend*, aabnede Festen med en Tak til de udenlandske Gæster for deres Tilstedeværelse, hvorefter en Irlænder, en Indier, en Englænder, en Serbier, en Amerikaner, en Franskmand samt en Dansker (*Frk. M. Noll*) talte som Repræsentanter for de forskellige tilstedeværende Nationer.



Patrolanda kanto

de


Adam Oehlschläger.

Jen lando kun arbar'
 El belaj largaj fagoj
 Ĉe la Baltika Mar'.
 Monteto kuŝas apud val',
 Danlando ĝi nomiĝas,
 La alta Freja-hal'.

Antaŭe de l'batal'
 Ripozis tie viroj
 En vest' el fer' kaj ŝtal'.
 Milit' al ili estis ĝoj',
 Nun dolĉe ili dormas
 Sub Baŭtaŝton ĉe l'voj'.

Ĝis nun la blua mar'
 Beligis tiun landon,
 Ornamis ĝin arbar'.
 Kaj nobla, ĉarma virinar',
 Kaj bravaj viroj loĝas
 Je l'dana insular'.

Trad. J. Wulff.



Nia Lando

Kiel rajtigataj delegitoj dum „la oka“ ĉeestas por C. D. E. L. Fino *Margrethe Noll* kaj Sro *Ad. B. Hansen*, dum Esperanta Unuiĝo de Danaj Instruistoj elsendis Finon *Asta Mikkelsen*.

La piedirado ĉirkaŭ Selando. En la lasta numero mi priparolis la du piedirantojn, Sino Humphries kaj Sron Breckwoldt, sed ĉar la redaktado de la gazeto estis finata antaŭ ilia reveno, mi ne povis priparoli la rezulton de la irado. Ĉar eble kelkaj el la legantoj interesas sin por ili, mi mallonge raportos pri ilia prezentado.

Naŭ tagojn kaj noktojn ili iris kaj entute nur dormis kaj ripozis 29 horojn. Du noktojn ili eĉ pasigis sub la blua ĉielo, ripozante en „hotelo la fojn-stako“, kiel sprite la sinjorino baptis ilian loĝejon.

La longeco de la tuta vojo estis 224 angl. mjl.

Pro la terura varmego kaj pro nove planditaj botoj la sinjorino dumvoje havis veziketojn sur la piedoj kaj tial multe suferis dum la irado, alie ili pli rapide estus finitaj la vojon.

Kuracisto eĉ malpermesis al Sino Humphries daŭrigi kun tiom malsanaj piedoj, sed ŝia fera volo malpermesis ŝin halti, la kuracisto tial insiste petis ŝin iri tre malrapide kaj singardeme. Ŝi tion faris kaj uzis 24 horojn por iri 16 angl. mjl.; oni certe komprenas, kiom dolorplena tiu irado estis por ŝi, kiu tamen iris kun ĝoja mieno.

Dum la lastaj 45 horoj ili nur ripozis entute 5 horojn, kaj de Helsingør ili iris senhalte al Kopenhago.


Je la alveno al Kopenhago post la 10^a vesp. ambaŭ faris paroladon pri la irado, kaj reciproke ili esprimis la plej grandan admiron unu por la alia. Sro Breckwoldt diris, ke se estus eble al virino ĉirkaŭiri la mondon, Sino Humphries certe estas la virino, kiu tion faros; kaj ŝi diris, ke ŝi neniam vidis viron kun tiom da nelacigebla persisteco, kiom havas Sro B; li tiris la veturilon, kies pezo kun pasaĝero kaj pakaĵo estis 200 kg., supren kaj malsupren de la montetoj, neniu, kiun ili renkontis survoje, estis eble suprentiri ĝin eĉ al sufiĉe malgrandaj altaĵoj.

La sinjorino, kiu nun bone komprenas, kiom fortaj kaj persistemaj estas la vegetaranoj, promesis al Sro B., imiti lian ekzemplon kaj fariĝi vegetarano.

Kiel oni vidas, la vizito de S^{ro} Humphries en Danujo ne estis vana, ŝi renkontis ĉe ni kaj la esperantismojn kaj la vegetarismojn, du-ismojn, kiuj povos fariĝi al ŝi granda helpo dum ŝia longa promenado.

Margrethe Noll.

Post la morto de nia eminenta samideano S^{ro} Frederik de Skeel-Giörling ne estis dano en „Lingva komitato“ ĝis nun, laŭ propono de C. D. E. L., la plej lerta el la danaj esperantistoj S^{ro} Frédéric Baruël ricevis elekton kiel membro de la komitato. Ni gratulas tutkore la novan komitatanon kaj speciale la komitaton, ĉar ĝi malfacile povus trovi pli taŭgan kunlaboranton kaj pli indan sekvanton de nia tro frue mortinta samlandano.



Bibliografio.

Esperanto—Dansk-Norsk Ordbog de P. A. Dueholm. (Ĉefa komisio: M. Christiansen, Struer).

Ĝus aperis nova Esperanto-dana vortaro sub la supre montrita titolo. La aŭtoro, S^{ro} Dueholm, diras en la antaŭparolo, ke li ellaboris sian vortaron, ĉar li trovas, ke la jam ekzistantaj danaj vortaroj ne sufiĉe plenumas la postulon rilate al la amplekso de la enhavo. Tial S^{ro} D. precipe riĉigis sian vortaron per sciencaj vortoj, ĉerpitaj el niaj plej bonaj eksterlandaj vortaroj ekz: *Kabe, Verax, Bricard, Menil*, k. t. p. S^{ro} D., kiu estas instruisto, estas specialisto en botaniko kaj zoologio, kaj tial la nomoj, kiuj apartenas al ĉi-tiuj du sciencoj, certe estas elektitaj kun granda kompetenteco kaj lerteco. Uzante aliajn vortarojn kiel bazon por sia vortaro, li ne estas kulpa, se ekster lia specialo ia aŭ alia vorto ne estas bone elektita.

Por fari la vortaron tiel praktika kiel eble la aŭtoro uzis mallongigan sistemon, kies ŝlosilon oni trovas en la komenco de la libro. Dank' al ĉi-tiu sistemo, la aŭtoro sukcesis trione malgrandigi la amplekson de la libro.

Ĉapitro de la vortaro pritraktas prefiksojn kaj sufiksojn speciale teknikajn kaj sciencajn.

Nur ŝajnas al ni superflue kunpreni vortojn skribitajn kun la litero *w*, ĉar ĉi-tiu litero ja ne troviĝas en la Esp.-alfabeto, kaj sekve ne troviĝas en Esp.-vortaroj.

DANLANDO

La aŭtoro ankaŭ kunprenis vortojn, pri kiuj li mem opinias, ke ili estas dubaj kaj nur uzataj de nelertaj esperantistoj; li markas ilin kun »?«, sed tamen ŝajnas, al ni, ke tio estas erariga por aliaj nelertaj personoj, kiuj eble eĉ ne legis la paragrafon, kiu klarigas, kial la demanda signo staras tie.

Krom al la danoj ni ankaŭ povas rekomendi la vortaron al la norvegaj samideanoj, ĉar ĝi enhavas norvegajn vortojn.

En la antaŭparolo la aŭtoro dankas siajn du kunlaborantojn Sron instruisto *H. K. Hansen*, Feldborg, kiu partoprenis en la ellaborado de la verko kaj Sron stud. jur. *M. Blicher*, Kopenhago, kiu apogis lin per bonaj konsiloj rilate al aplikinda materialo por la ellaborado.

Vekiĝo, Internacia sendependa Organo por la Defendo de Esperanto, ĵus aperis en Parizo redaktata de la du fervoraj defendantoj de nia lingvo Sroj *Jean Couteaux* kaj *René Dubois*. Ĝian celon montras la titolo. Speciale la gazeto volas kontraŭbatali tiujn personojn, kiuj dissemas suspekton al esperantistoj, kiuj senlace kaj sindone laboras. Ni varme rekomendas la gazeton al niaj legantoj.

Hele Esperanto de *S. Engesgaard Christie*. Jen la unua tute norvega lernolibro en la internacia lingvo, eldonita de „Norvega Esperantista Ligo“. Ni varme povas rekomendi tiun libron al ĉiuj norvegaj samideanoj, ĉar ĝi estas sen eraroj kaj taŭgas bonege kaj por instruado kaj por memstudado.

Literatura Parto

La naĝbarelo.

de

Vaganto.

Iafoje balancadis sur la maltrankvilaj ondoj de la maro, for, for de la bordo, nevideble de ia lando, sola naĝbarelo. Ĉenita dum la longaj jaroj al sia loko ĝi, sur ondoj neniam kvietaj, balancadis kaj sonoritis konstante.

De tempo al tempo proksime de ĝi pasis ŝipoj, grandaj mar-ŝipoj, ĉar la signalilo montris la turnpunkton de la vojo ĉirkaŭ danĝera rifo da rokegoj kaŝitaj en la maro. Kaj la homoj sur la ŝipoj kutimis rigardi la naĝbarelon, kaj preskaŭ ĉiam diradis: „Ho, kiom sola, kiom terure devus esti, ĉiam esti katenita tie“.

Longe la naĝbarelo aŭdis tiajn rimarkojn, ĝis kiam, fine, ĝi ne povis plu toleri la esprimon de kompatemo, kiun oni ĉiam faris pro ĝi. Kaj ĝi skuis pli forte siajn ĉenojn, kaj furioze balancante sian sonorilon, respondis: „Vi, homoj malsaĝaj, nomas min sola, kaj min kompatas pro la izoleco. Sciu do, ke mi ne ŝanĝus volonte mian lokon por tuta la vivo, de vi ŝatata, en la mondo! Nek tage, nek nokte mi estas sola! Birdoj min vizitadas, kaj paroletas al mi pri la faraĵoj de la malproksima lando; ĉe miaj ankroj kaj ĉirkaŭ la miaj fortaj katenoj ĉe la rokoj sube, tie kunvenas la fiŝoj — jes, la tuta fiŝaro de la maro nomas siajn rendezuojn „ĉe la ĉenoj de naĝbarelo“, kaj mi aŭdas la sekretojn de malproksimaj lokoj sub la maro, tiel same kiel de la birdoj mi sciiĝas pri okazantaĵoj surtere. Kaj kiam, ekzemple, ŝipo pereas, kaj homoj dronas, tiam, mi, sole mi, aŭdas pri ili, kie ilia estas la ŝipo, kaj kiel ili mortis, ĉar la fiŝoj tion ja diras unu al la aliaj ĉe mia ankrejo. Kaj kiajn terurajn rakontojn ili diras, — ja la sango kurus malvarme tra viaj vejnoj ilin nur aŭdi! Kaj ankaŭ la homoj en ŝipoj ĉiam min serĉas; longe, longe ili turnas la fortajn lornojn al mi, kaj serĉas, serĉas. Kaj kiam ili fine, malproksime, min vidas, ili ĝojas, ĉar tiam ili scias la vojon. Kaj ili pasas ĉiam proksime de mi, kaj sur kelkaj el la ŝipoj estas miaj amikoj, malnovaj amikoj, kiuj min ĉiufoje salutas, kiam ili pasas! Ĉu tage, ĉu nokte, la ŝipoj min serĉas, nokte — per akraj aŭdiloj provas kiel eble plej frue aŭdi la bat - bat - baton de mia granda sonorilo; kaj aŭdinte ĝin, ili denove havas trankvilajn, kvietajn vizaĝojn, ĉar ili scias, ke neniam mi trompis en mallumo, sed ĉiam avertis pri la rokoj sub mi!


Kaj kelkafoje homoj venas por min rigardi, — ili forprenas rustiĝintajn ĉenojn, kaj rebonigas miajn flankojn enbatitajn de la ondoj, — ili freŝe min koloras, supre ruĝe, hele ruĝe mi brilas en la suno, kaj ĉe la akvo blanka zono min ĉirkaŭas! Ha, tiam longe mi forte batas la sonorilegon, ĉar ĉu mi ne estas bela en mia nova vestaĵo?

Kaj la homoj — ili kiuj pasas en grandaj, komfortaj ŝipoj, — apogas sin sur la barilojn kaj min kompatas „ĉar mi estas sola! Fi!“

DANLANDO

Johan Martin Schleyer

La Kreinto de Volapük



* 18. Julio 1831 — † 16. Aügusto 1912

Ŝako.

Komencante ĉi-tiun ŝakfakon ni petas kunlaboradon de ĉiuj ŝakamantoj inter la Esperantistoj, petante ilin sendi al ni originalajn problemojn kaj interesajn ludadojn, dum ni ankaŭ estus dankemaj ricevontaj sciigojn pri novaĵojn el la ŝakmondo.

Por krei interrilatton inter la Esp-ŝakludantoj ni invitas ilin por fari internacian korespondan ŝakturniron sub ni gvidado kaj sub sekvantaj kondiĉoj:

Ĉiu partoprenanto devas ludi 2 ludadojn kun ĉiu el la aliaj per poŝtkartoj afrankitaj.

Tempo por pripensado ne devas esti pli ol 3 tagoj post la ricevo de la movoj de l'kontraŭulo.

Se almenaŭ sin prezentas 6 partoprenantoj „Danlando“ promesas donaci du premiojn je 10 kaj 5 Sm.

La luditaj ludadoj estos posedaĵo de „Danlando“.


La venkito de ludado — je nedecidita ludado la kondukanto de „Blanko“ — devas tuj post la fino de l'ludado sendi la ludadon, priskribita per la aremetika notacio, al „Danlando“.

Ĉar la turniro devas komenci je la 1-a de Novembro ni petas sciigojn pri partopreno antaŭ la 15-a de Oktobro.

Problemo 1

de *Andr. Nissen*, Kopenhago (originala)

Nigro



Blanko

Ekludante, Blanko matos per la 2-a movo.

DANLANDO

En la majstroturniro en Breslau dividis Rubinstein kaj Duras, kiuj ambaŭ atingis 12 poentojn, la 1-an kaj 2-an premion inter si, dum Teichmann ($11\frac{1}{2}$) ricevis la 3-an.

La sekvanta ludado devenas de ĉi-tiu turniro.

Ludado 1.

Blanko: *Lewitzky*.

Nigro: *Marshall*.

Franca ludkomenco.

- | | |
|--------------|---------|
| 1. d 2—d 4 | e 7—e 6 |
| 2. e 2—e 4 | d 7—d 5 |
| 3. Ĉ b 1—c 3 | c 7—c 5 |

Laŭ opinio de Marshall estas ĉi-tiu movo la plej bona en ĉi-tiu pozicio.

- | | |
|---------------|-----------|
| 4. Ĉ g 1—f 3 | Ĉ b 8—c 6 |
| 5. e 4×d 5 | e 6×d 5 |
| 6. K f 1—e 2 | Ĉ g 8—f 6 |
| 7. 0—0 | K f 8—e 7 |
| 8. K c 1—g 5 | 0—0 |
| 9. d 4×c 5 | K c 8—e 6 |
| 10. Ĉ f 3—d 4 | K e 7×c 5 |
| 11. Ĉ d 4×e 6 | f 7×e 6 |
| 12. K e 2—g 4 | D d 8—d 6 |
| 13. K g 4—h 3 | T a 8—e 8 |

La pozicio de Nigro estas nun bonega

- | | |
|---------------|-------|
| 14. D d 1—d 2 | — — — |
|---------------|-------|

a 2— a 3 estas pli bona movo

- | | |
|---------------|-----------|
| 14. — — — | K c 5—b 4 |
| 15. K g 5×f 6 | T f 8×f 6 |
| 16. T a 1—d 1 | D d 6—c 5 |
| 17. D d 2—e 2 | — — — |

Kun la minaco T×d 5

- | | |
|---------------|------------|
| 17. — — — | K b 4×c 3 |
| 18. b 2×c 3? | D c 5×c 3 |
| 19. T d 1×d 5 | Ĉ c 6—d 4! |
| 20. D e 2—h 5 | T e 8—f 8 |
| 21. T d 5—e 5 | T f 6—h 6 |

Nun havas Blanko neniun defendon plu, ĉar li devas movi la turon kaj post 21 T c 5 sekvas Ĉ e 2 † 22. R h 1, T×f 2 kaj venkas.

- | | |
|---------------|-----------|
| 22. D h 5—g 5 | T h 6×h 3 |
|---------------|-----------|

Blanko ja ne povas kapti la turon pro Ĉ f 3 †.

- | | |
|---------------|-------------|
| 23. T e 5—c 5 | D c 3—g 3!! |
|---------------|-------------|

Estas tute surpriziganta Damofero, ĉar post 24 h×g sekvas Mato per Ĉ e 2, post 24. f×g ankaŭ Ĉ e 2 kun venonta Mato kaj post 24. D×g 3 sekvas Ĉ e 2; 25. R h 1, Ĉ×g 3 †. Blanko estas tute ruinigita, pro kio li ĉesis.

Hotel-Adresaro.

Odense, Hotel Ansgar.

Biskvitoj kaj **Mielkukoj**

Bona biskvito, mastraĵa
biskvito, sekala biskvito
kaj mielkukoj.

Skribu al la farejo de
F. Holle,
Aalborg, Danujo.

Laŭpete mi sendas **senpage**
(se la provizo sufiĉas)
paketon kun unu el la tri
artikoloj.

Ilustrita **Gvidlibro** **pri Vejle**

havebla ĉe

Eldonejo Esperantista
Strandgade 11,
Kopenhago.

==== *Prezo: 35 Øre* ====

(aŭ 2 respondkuponoj).

KØBENHAVNS PARAPLYFABRIK

Østergade 58.

Bastonoj kaj Ombreloj
- - - je ĉiuj prezoj - - -

Telefon 8610.

Telefon 8610.

Esperanto-Oficejo

(Esperanto-Kontor) U. E. A.

Bredgade 35, København.
(Kopenhago)

Bela poŝa ŝtampilo (la emblem-
desegno) kun kuseno.

Prezo: Kr. 2,50 (sm. 1,500).

Ŝtampilo: (la verda stelo). Nur:
35 Øre (25 sd.).

Kuseno: 35 Øre (25 sd.).

:: Propagando-markoj ::

(folio po 100 ekz.).

Prezo: Kr. 1,00 (sm. 0,60).

Emblemoj, leterpaperoj, kovertoj,
poŝtkartoj, silkflagetoj, propagand-
iloj, k. t. p.



AMATOROJ!

Aĉetu viajn
fotografajn bezonaĵojn ĉe

MIMOSA
Kopenhago,
Vimmelskaftet 43.



Redakcio kaj Administracio: Strandgade 11, Kopenhago.
Abonprezo: En Danlando 2 Kr. En eksterlando 3 Kr. po jaro.

C. M. Hess, Vejle.



Fornoj laŭ desegn-
aĵo de konataj
danaj artistoj en
plejgranda elekto.

Ŝirmfornoj

tre elegante
nikelumitaj.

Kuirfornoj, kaj iz-
ole starantaj kaj

por enmurigo kiel ankaŭ
por hoteloj. Ĉiu speco de
fandaĵkonstruaĵoj.

**Plej malkara kaj plej
bona fabrikaĵo.**

Alt

Bogtryk

hurtigst
billigst

**Harald Jensens
Bogtrykkeri**

Admiralgade 24
Tif. 5199